

Aveno 34 (2009) - Ekologio kaj Ekonomio

Ekologio & Esperanto:

Amendi la UEA-Statutojn: "Dauripoveco"

Jam 1998 je la postkongresa seminario al la UK en Montpellier, en Larzac-Regiono, AVE diskutis la statuton de UEA - kaj sekve sendis leteron por amendi la statuton.

1999 dum la UK en Berlino okazis voĉdono pri ni amendo-propono ene de UEA, bedaurinde negative.

2006 la UK-temo en Florenco estis: "Lingvoj, kulturoj kaj edukado al daurigebla evoluo", sed ne eblis diskuti nian amendon (letero de 1998-09-06 al UEA):

Amendi la UEA-Statuton per kroma punkto A.3.d (la proponita cifero 3d rilatas al la statuto de 1980):

"eduki inter siaj membroj la konsciencon, ke iliaj agadoj devas akordi kun la Principo de Dauripova Evoluo sur nia planedo"

--

Argumentoj de Wolfgang Guenther (2009-11-08, EcoMed) - literumado NHA: y=j, j= gh, zh=jh:
Al la estraro de la Universala Esperanto-Asocio & al kiuj koncernatas

Estimatay gesamideanoy, vi chiuy scias pri la strebado de esperantistay ekology & de ekologie interesatay esperantistoy (ekz. tiuy en AVE, la Asocio de Verduloy Esperantistay, kunlaboranta kun UEA ekde 1994, kp. la yarlibron) koncerne ekologian amendon de la UEA-statuto, bazitan sur la imanenta ekologia memidenteco de Esperanto (kp. mian artikolon en Scienca Revuo, vol.60 (2009) (2), n-ro 217, Interna ideo, homay raytoy kay ekologia perspektivo) & sur la nocio "dauropov(ec)a evoluigo", kiuy la UN & la civilsocio chirilate uzas.

Chiletere mi atentigas vin & la ceterayn oficialayn Esperantistayn organizazhoyn, ke kun dato de 2009septembro02 la Ekumena Konsilantaro de la Ekleziy (EKE) akceptis "Deklaracion pri Ekoyusteco & Ekologia Kulpo". En ji sub punkto H. tekstas yene:

La centra komitato "urje alvokas la EKE-membroekleziyoy & ekleziayn instancoyn partnerece kun la civilsocio efektivigi provaudoyn pri la ekologia kulpo, inklude memtakson pri la propra konsumsinteno. La EKE precipe evoluigu mekanismoyn cele kompensadon de dum siay kunvenoy estijantay ekologia kulpo & kolektu partnerece kun grupoy & movadoy de la civilsocio modeloy de agnosko, prevento, mildigo, kompenso, reparacio & rekompenco de ekologia debeto*."

Yuste chi tio estas ankau unu el la chefay celoy de supre menciita amendo. Mi konsideras la aferon tre grava & urja. (lau letero de Wolfgang al UEA: w.guenther.esperanto@web.de)

Energio, atomenergio

Karaj geamikoj - aparte en meza Europo, mia plej proksima atom-centralo estas Fessenheim, en Francio, sed nur je la alia flanko de la rivero Rejno (30 km for de ni - sud-okcidente)

Ghi estas unu el la plej malnovaj en Francio, kaj oni jhus rekontrolas, chu ghi povus servi pliaj 10 (?) jarojn. La radio-stacio France 3 Alsace nun faras publikan opinisondadon, chu fermi Fessenheim ?

Kompreneble ni preferas tion - jam delonge. Krom la daura elsendado de radioaktivaj isotopoj, de fendetoj, estas la minaco de termotremo en nia regiono au pri aviadila krasho. Jen la URL, 2009-12-17 :

<http://alsace.france3.fr/info/alsace/>

<http://alsace.france3.fr/info/alsace/>

[Bonvlu rigardi - meze/sube la areeton: "Votre avis" - kaj Oui = JES](#)

Eble vi povus aktivi je <2009-06-15> Tutmonda Ventoenergio-Tago: Sperti la eblecojn de la ventoenergio kaj diskuti pri la temaro. Chu ekzistas ankau tutmonda tago de la regajneblaj energioj kaj efika uzado de la energio ? <http://www.globalwindday.de> [de]

Atomreaktoroj: nek la novaj Usonaj nek Europaj estos sufiche sekuraj:

<http://www.newscientist.com/article/dn18219>

Alternativa kurento: (de) <http://www.naturstrom.de/> , (de) <http://www.ews-schoenau.de/mitwissen.html>

Diversaj informoj kiel shpari energion:

(de) <http://www.ews-schoenau.de/runterladen/energiesparen.html>

Fairplanet (justa planedo): Internacia kooperativo, kiu investas paralele chefe pri la uzado de regajneblaj energioj en Europo kaj en evoluighantaj landoj: (de, en) <http://www.fairpla.net/>

Ne-sekuraj novaj atomreaktoroj en Usono kaj Europo:

<http://www.newscientist.com/article/dn18219>

100 Bonaj argumentoj kontraŭ la atomenergio: Tre ampleksa fakto-kolekto kun ligoj al la dokumentoj: (eo) <http://www.verduloj.org>, (de) <http://100-gute-gruende.de/lesen.xhtml>

Pozitive por P.R.Chinio: Oni ofte audas de katastrofoj en chinaj karbo-minejoj. Aliflanke ghis nun oni ne tre observis la energio-efikan konstruadon. Parte la korupcio kvazau malhelpis pli bonan konstruadon. Sed nun oni klopodas konstrui pli bone por redukti la hejtadon en norda Chinio kaj ankau la malvarmigon dum la someroj. Ekz-e GTZ (germana shtata asocio por teknika kunlaboro) subtenas tion. (de, en) <http://www.gtz.de/de/index.htm>

TV-filmo "Koshmaro atom-rubajho", montrita de ARTE - videbla ghis mardo 20a de Oktobro 2009. <http://plus7.arte.tv/de/1697660,CmC=2883850,scheduleId=2853790.html>

kaj **Germanaj kaj francaj radioaktivaj uranio-rubajhoj estas transportataj al Sewersk, Siberio, Rusio**. Temas pri malrichtigita uranio-heksafluorido, kio estas toksa kaj ankau enhavas restajhon de radioaktiva uranio. Lau tiu informo la bareloj staradas ja subchiela areo.

Pli detale pri tio (en la germana TV): <http://www.tagesschau.de/atommuelldeutschland100.html>

Ghis nun nek Fracio nek Germanio havas solvon por eterne stokadi radioaktivan rubajhon. (lau Bad. Zeitung, 2009-10-15, p.2 kaj lau Liberation, kelkaj tagoj antaue)

Radioaktiva Cezio, Cs-137, estis trovita en lignaj stangetoj (en: pellets), por hejti.

Ili venis de Litovio al Italio, kaj la esploro okazis pro malbon-kvalita brulado.

La kvanto esti 40-obla de la permesata valoro. Je pliaj kontroloj oni retrovis nur kelkajn poluitajn specimenojn. Tamen, la homoj estis avertitaj ne uzi la cindron de tiu lignajho sen kontrolo pri radioaktiveco. La ligno-cindro utilas por la ghardeno pro la mineraloj - sed en tiu kazo ghi estas danghera. Litovio ankau estis poluita de la radioaktiva pluvo post la katastrofo de Chernobil. Kaj eble parto de la ligno venis ne el Litovio ?? (lau la jhurnalo "neue energie", 07/2009, p. 93)

Sabato 2009-10-03 Manifestacio Sortir du Nucleaire en Colmar, Francio/Alsaco.

Chu ni sukcesos "blokon" da Esperantistoj kun rubando en la manifestacio ?

(fakte cheestis 3 esperantistoj) - koncize - pardonu la miksitajn lingvajhon:

14:00 Uhr: Intern. Kundgebung und Anti-Atom-Demo bis 18:00 Uhr, Place Rapp

19:00 bis 21:00 : zwei Vorträge mit anschl. Diskussionen (mit Übersetzung):

"Fessenheim stilllegen, Alternativen für den Atomausstieg"

"Die Anti-AKW-Bewegung - Rückblick und Perspektive"

"Déchets, le cauchemar du nucléaire" in einem Colmarer Kino

Dimancho 4a de Oktobro | Internationales Aktionswochenende in Colmar (und Exkursionen)

- verschiedene Vorträge mit anschl. Diskussionen (Park Natala Colmar ab 10.30 Uhr)

* Zivile und militärische Nutzung der Atomenergie ... "CDRPC"), * Atommüll und AKW-Rückbau

* Uranabbau: - Internationales Umfeld (Günther Wippel, Mitglied uranium network.org)

- Zusammenhang Niger ("Aghali Mahiya", Tuareg "u.ehem. Uranbergbauarbeiter")

en Niger okazas medio-poluado kaj mallevido de la grundakvo pro la ekspluatado de uranio !

- Uranabbaugebiete in Frankreich (Roland Desbordes de la Criei-Rad)

* Projekte und Strategie der Atomindustrie: - EPR-Reaktor (Didier Anger, ehem. MEP, Regionalratsmitglied, Sortir du nucléaire) * Endlagerung (Michel Marie, Federation Grand Est)

* ITER - esploro de fuzio-reaktoro (Pierre Peguin, Sortir du nucléaire)

* Greenwash und neue Durchsetzungsstrategien für Atomkraftwerke (Axel Mayer)

(de) <http://vorort.bund.net/suedlicher-oberrhein/termine.php?year=2009&month=10>

(fr) <http://www.fermons-fessenheim.org/>

2009-09-05 Atomenergio - Ne Dankon ! Finfine Malshalti !

Centrala manifestacio en Germanio okazis en Berlino, kaj ankau en aliaj urboj, por haltigi la atom-energien. En Berlino partoprenis pli ol 50.000 da homoj kaj centoj da traktoroj el tiu regiono kie la registaro planas fari fin-stokejon por la radioaktiva rubaĵo en Gorleben, sude de Hamburgo. Partoprenis ankau la Verda kaj la Rughaj partioj. La ministerio por medioprotekto eldonis broŝuron kun kontrau-argumentado kontrau la mitoj flanke de la atomindustrio. Pluraj malgrandaj okazajhoj je la atomreaktoroj kaj pli grave la statistike rimarkebla altigo de leukemio de infanoj kiuj loĝas proksime (ghis 20 km) de atomcentralo minacas la homojn. epidemiologa studo je 80 atomcentraloj en DE,FR,GB,CA,US montris tion por junaj homoj ghis 24 jaroj: <http://www.ippnw.de/>
Kaj finfine la malbona informpolitiko rilate la prov-stokejo Asse, salo-minejo kie eniras akvo, kie ekz-e trovighas trioble pli da plutonio ol atestita, hejtigis la proteston de la mal-protestemaj germanoj. (taz, 2009-09-05, p.1) : Foto de la manifestacio trovighas i.a. je la retejo de la germana Verda Partio: <http://gruene.de/einzelansicht/artikel/mehr-als-50000-auf-der-atomdemo.html>

Aveno 2009-08-06: Ni ne forgesu la atombombojn sur Hiroshima kaj Nagasaki.

Nur la tutmonda plena neniigo de la atom-arsenalo povas eviti duan fojon.

Katastrofoj kiel tiu en Cheljabinsk-40 (1956/'57) kaj testeksplodoj venenigas (Pu, Sr, Cs, J, ...) grandajn areojn kaj la tutan mondon per radioaktivaj isotopoj. Por multaj homoj, bestoj kaj plantoj tio signifas rapidan morton, au malrapidan mortadon.

Jam la ekspluatado de Uranio venenigas grandajn areojn. Uran-energio ne estas daurigebla.

La grandaj posedantoj de atombomboj devas antaŭeniri; UN devas decidi kaj kontroli.

Espereble tiam la aliaj landoj finos la atom-fendan vojon.

Reago pri la malshalto de kelkaj francaj atomreaktoroj:

Kontrau la varmigo de la klimato certe estus multe pli bona malshalti la karbonajn centralojn en Britio kaj Germanio ol malshalti la atomreaktorojn en Francio.

Ĉar oni jam sukcesis pasigi leĝojn kontrau tro altaj akvotemperaturoj oni devus nun batali por leĝoj kontrau tro altaj aertemperaturoj por ankau halti la karboncentralojn en la somero, kiuj forjhetas ilian troan varmecon al la aero anstataŭ al riveroj...!!

Nur per samtempa malshalto de karbon- kaj atomcentraloj en europa homoj konscios pri la urgha neceso de novaj energifontoj. Amike, Benno

Uranio - jam la ekspluatado kaŭzas malsanojn.... jen kelkaj paghoj:

Ampleksa artikolo en ĵurnalo "natur und kosmos" Junio 2009:

www.natur.de/scripts/basics/natur/news/basics.prg?session=d9e9387d4a630f2d_381118&a_no=3003

dokumenta filmo: <http://nukingtheclimate.com/>

<http://www.nuclear-free.com/>

Energia repago (amortizigho) de regenerativaj energioj, bezonitan por ghia produktado:

Vento-generatoroj bezonas averaghe nur duonan jaron.

Fotovoltaiko bezonas inter 2 - 5 jaroj por regajni la bezonitan energion.

La vivodaŭro de tiuj instalajhoj estas pli ol 20 jaroj; do, entute granda gajno da energio. Sed alia afero estas la financa repago de la investita sumo: ghi estas pli longa kaj ege dependas de la prezo por la energio. Jen interesa ligo al pagharo kiu kovras multajn temojn de grupo ĉirkaŭ Al Gore.

angle: <http://www.cleanenergy-project.com>, germane: <http://www.cleanenergy-project.de>

2009-07-03 Francio importas elektran energion dum Julio el Britio. Pro la varmego multaj enlandaj atomreaktoroj devas esti malshaltitaj. 14 el la 19 starejoj uzas river-akvon, kaj la permeso estas limigita al maksimuma akvo-temperaturo de 24 Celsius-gradusoj. Je la 3-a de Julio Francio importis el Britio 1000 MW (ekvivalentas al 1 nova atomreaktoro). EdF diris ke la import-bezono dum la somero estos ghis 8 GW (la elektro-konsumon de Parizo). (lau Robin Pagnamenta, Energy and Environment Editor) Kom-o AVE/mw: Francio somere ankau importas kurenton el Germanio. Unu el la kaŭzoj estas la klimato ne-oportunaj konstruajhoj, kiuj bezonas kurenton por malvarmigi.

Ekologio & Kemia & Teknologio

Nano-materialo: promesas novajn efektojn, ni sekvu la aferon. Uzado en manghajhoj au kosmetikajhoj estas dubinda, ĉar povas okazi simile kiel je Asbesto (kancero montrighis nur 20 jarojn poste).

Uzado en fiksitaj materialoj eble plibonigas pli ol ghi damaghas.

Registro pri emisio kaj prilaboro de poluajhoj (angle: Pollutant Release and Transfer Register).

Temas pri firmaoj, uzinoj grandaj bestobredejoj, klariginstalajhoj. Prezantata de la ministerio pri la medio en Germanio - pere de "Links" vi atingos aliajn landojn: <http://www.prtr.bund.de> (taz 2009-06-06 p.8)

Responde al la demando pri gruzo: Demando plusendita de J.K.Rinaldo

Monique JUY <monique.juy@wanadoo.fr> demandas:

Chu vi konas iun, kiu scius chu la ekspluatado de la riveraj gruzoj estas permesata en Italujo?

Rekta respondo: Jes, bedaŭrinde!!!: oni donas teritoriajn koncesiojn dum difinitaj jaroj.

Detala respondo - kiu eble povas helpi ankaŭ aliloke:

la temo estas tikle pridisputata ankaŭ en Italio, pro la negativaj sekvoj de senpripensa eltirado de gruzo sur la ghustan fluadon de la riveroj. Jen kelkaj juraj notoj pri la temo:

En Italio, principe kaj ĝenerale validas (ankorau!) la leĝo pri hidraulikaj verkoj 25.7.1904, numero 523, kies artikolo 97 antaŭvidas, ke oni povas eltiri shtonajn materialojn (inter kiuj trovighas gruzo) nur post speciala rajtigo kaj laŭ la preskribitaj kondiĉoj.

La efektiva situacio, tamen, estas grandparte alia pro multaj kaŭzoj:

1) oni kalkulas, ke nur 10 procentoj el la eltirita gruzo estas rajtigataj, dum 90 procentoj estas eltiritaj kase au kun la ŝajna pravigo, ke oni celas purigon de la riverujo por eviti inundojn;

2) la fako estas dispartigita inter plurajn publikajn instancojn:

kompetentas, ja, la Ŝtato (pro tio ke temas, almenaŭ parte au akcesore, pri hidraulikaj verkoj), la Riverbasenaj instancoj (kiuj ofte kovras la teritorion de pluraj Regionoj), la Regionoj (ĉar temas ankaŭ pri shton-minejoj), la Provincoj. La sekvo estas, ke (depende de la lokoj) au la kontroloj tro multas (kaj facile oni povas jure plendi kontraŭ eventualaj sankcioj, asertante ke la aganta aŭtoritato ne kompetentas), au ili mankas (ĉar ĉiuj instancoj asertas, ke kompetentas aliaj subjektoj);

3) se iu koncesiulo forprenas pli da gruzo ol li rajtus laŭ la koncesio, li riskas (laŭ artikolo 13 de la leĝa dekreto 12.7.1993, n. 275) monpunon en alteco kvinobla kompare kun la ordinara koncesia tarifo; tamen, ĉar la kontroloj estas tre sporadaj, kaj ĉar la koncesiaj tarifoj estas relative malaltaj, la koncesiuloj alfrontas facilanime tiun riskon.

(sekvas 4+5 ...)

Amike, Antonio De Salvo (jughisto)

2009-05-12 Elektrosmogo en EU - danĝero ankoraŭ tro granda. La EP ja decidis la principon de antaŭzorgo, sed ili prokrastas la enkondukon de pli sekuraj limvaloroj per enkonduko de komitato kiu kontrolu ĉu la valoroj, enkondukitaj en 1999 de la EU konsilio de la ministroj, estas akcepteblaj. La limvaloroj estas diverse altaj en la diversaj EU-ŝtatoj kaj laŭ la principo "Plej Bone" oni povus preni ekz-e tiun de Luksemburgo kiu estas malpli alta je faktoro 14. Pli pri tio de Hiltrud Breyer, MEP de la germanaj Verduloj. <http://www.hiltrud-breyer.eu/hbreyer/fe/pub/de/dct/491>

Ekologio & biologio & akvo & grundo & agrikulturo & GMO & klimato

Klimato-Shangho: Argentinio shanghis la klimaton pere de forhakado de grandaj arbaroj por planti soj-faboj (GMO), kaj ankaŭ la areo de herbejoj (la Pampa Humeda) kie estis bovoj nun estas agroj.

La grundo solidighas kaj la pluvo ne plu eniras en la grundon tiom kiel antaŭe (inundoj post pluvo). Eble adicie venas la perioda klimato-shangho inter El Niño kaj La Niña por akriĝi la situacion. Nun oni raportas ke jam miliono da bovoj pereis pro manko da akvo.

Estus saghe re-shanghi tian politikon, kaj eble manghi malpli da bov-viando, kaj redukti la soj-fabo plantado. (laŭ J. Vogt, taz, 2009-03-11), krome - NRO: <http://www.fundapaz.org.ar> [es]

Agrokulturo sen plugado altigas la humuson kaj akvo-tenadon en la grundo.

Temas pri pozitivaj rezultoj esploroj en Svisio de Paul Maeder (FiBL); fakte oni pluĝetas ĝhis 5 cm. (laŭ J. Maurin, taz, 2009-01-05, p.4), Esplorinstituto por Biologia Agrikulturo: <http://www.fibl.org/> [de,en,fr]

Grundo-protekto necesas: la oficiala Raporto pri la Grundo-Protekto de la germana ministerio montras la danĝerojn por la grundo, kio ankaŭ havas sekvojn por la klimato:

troa nutrado (produktas N₂O - "ridiga-gaso"), manko da humuso pro erozio kaj ne-kovrita grundo, kio krome malpurigas la riverojn. NABU postulas pli fortajn limigojn, kiun la registaron timas pro malfacila kontrolo. (laŭ J. Maurin, taz, 2009-04-09, p. 8) Naturprotekta NRO: <http://www.nabu.de> [de,en]

Bajkal-Lago & Klimatoshangho

La tutmonde altigantaj temperaturoj sekvas ke ankau je la Bajkal-Lago estas malpli longa periodo da frosto. Sekve de tio la diatomeoj (siliko-algoj) kiu jam floras sub la glacio de la lago havas malpli longan tempon por tiu evoluo. Sekve de tio la nutrajho-cheno - fishoj kaj finfine la Bajkal-fokoj - havas problemojn. La fokoj bezonas la glacieron ankau por havi idojn. Krome la kvalito de la lago, kiu enhavas 20% de la tutmonda trinkakvo, estas sub premo de la industrio (aparte de la paper-uzino en la sudo). Fonto: jhurnalo BioScience: Wellesley College (US, <http://www.wellesley.edu>) kaj la Universitato en Irkutsk, kiu proksimas al la lago <http://olddesign.isu.ru>. Vizitinda ankau <http://www.baikal.ru> [en, ru] (Iau J. Pernsteiner, presetext.austria, 2009-05-04)

--

Kunlaboro en la regionoj de la grandaj rivero-sistemoj:

ghenerale - International Water Association: <http://www.iwahq.org>

International Commission for the Protection of the Danube River: <http://www.icpdr.org>

Nile Basin Initiative (NBI) & Nile Equatorial Lakes: <http://nelsap.nilebasin.org>

Orange-Senqu River Commission (ORASECOM) aid the Commission was established in the year 2000 to advise Member States (Botswana, Lesotho, Namibia and South Africa), on matters related development and utilization, among other things. <http://www.ipsnews.net/news.asp?idnews=48505>
2009-09 Bundanun, urbeto en la sudaj Altlandoj de Nova Sud-Kimrujo en Aŭstralio (angle Wingecarribee Shire) faris rimarkindan paŝon en la milito por pli bona medio. Post du monatoj estos malpermesite tie vendi botelakvon. Tio estas aparta decido, certe en Aŭstralio, kie ĉiujare estas konsumata por 300 milionoj da akvo el boteloj. En la vilaĝo anstataŭe staros du akvopumpiloj. La iniciato havas ankaŭ ekonomi-jurajn bazojn. La agado samtempe estas protesto de malgranda komunumo kontraŭ grandaj kompanioj, kiaj Norlex kaj Coca Cola, posedantoj de la aŭstraliaj akvobrandoj Neverfail kaj Mount Franklin, kiuj forpumpas grundakvon de sub la piedoj de la loĝantoj de Bundanun por poste vendi ĝin al ili. Kiu jam nun interesiĝas, certe plu legu ĉe:

<http://www.goestingingroen.be/homeDetail.php?blogID=426> (en la nederlanda)

kaj - evidente - post la lego tuj aliĝi al la agado. <http://www.facebook.com/group.php?gid=111563356635&ref=ts>

<http://www.facebook.com/group.php?gid=111563356635&ref=ts>

(Leo de cooman & philippe.mingels@groen.be)

Savi la pluarbarojn: la homaro chiam tendencas uzi pli kaj pli de la naturaj areoj. Aparte endangherita estas la pluarbaroj, kiuj valoras tutmonde por la klimato, akvo-tenado kaj biologia riĉeco (hejmo de multaj bestoj kiuj ne povas vivi aliloke!).

Sojo, bovinoj kaj oleo-palmoj por energio estas la plej gravaj kauzoj, kaj jen kelkaj internaciaj ligoj rilate al la savado de la pluarbaroj: <http://www.regenwald.org/links.php?rub=3>

La verda miraklo en la dezerta Ordos-regiono: Yin Yuzhen kun shia edzo vivante en dezerta oazeto - en la Interna Mongolio, ene la la grandega kurbo de la Flava Rivero - dum 35 jaroj sukcesis allogi la pluvon en la dezerton. Ili plantis arbojn de multaj diversaj specoj, kaj studis kiuj pli taugas. tiel ili plibonigas la grundon kaj la mikro-klimaton. En la ombro de la arboj ili ech plantas legomojn. Shi estas unu el la 1000 paco-virinoj. Kontraste al la china registaro, kiu ja ankau plantigis arbarojn kontraŭ la dezertigo, shi ne uzas tiajn arbojn kiuj ege suchas multe da akvo kaj nutrajhoj - kaj eble nur taugas por produkti paperon. (de, en,es) <http://www.1000peacewomen.org/index.php>

Mem-entreprenantaj malriĉaj virinoj en Hindio fondis la asocion SEWA (self employed womens ass.). Ili protestas kontraŭ la ekspluato de virinoj en la ne-regula labormerkato, kaj postulas minimuman salajron por chiaj laboroj. Iliaj entreprenetoj kunlaboras kaj tiel havas rektan aliron al la merkato, kaj vivas pli bone kaj sekure. (en) <http://www.sewa.org/>

2009-08-15 Fulgo voras glacherojn

Aparte la fulgo de dizelo kaj karbo-bruligado, sed ankau de la forbruligo de arbaroj kauzas plirapidigon de la fandigho de glacheroj, char la nigraj fulgeroj kolektas la varmon de la suno. Pro tio ankau la ghenerala vaporigho altighas kaj shanghas la kreadon de nuboj.

tio signifas, ke ekz-e en la Himalajo pli rapide fandighas la glacheroj, kun pli da inundoj kaj iam malpli da akvo dum la somero, kiam la glacheroj reduktighis. La pli rapida fandigho de la glacio-tavolo en la Arkto-regiono jam kauzis ke kreighis nova vojo por ŝipoj chirkau la Norda Poluso; kaj la aktaj ursoj k.a. mamuloj havadas ekzisto-problemojn. <http://www.sonnenseite.com> kaj origine <http://www.duh.de/>

Alvoko al COP15 - partopreni la protest-agadojn okaze de la Klimata Pintokonferenco en Kopenhag je la 15a de Decembro 2009. Vidu la alkrochitan mesaghon de FYEG - Junaj Verduloj en Europo, kaj je la retejo de AVE: verduloj.org

Jen kelkaj retejoj pri la konservo de la natura/biologia diverseco:

Pri protektaj agroj (de/en): <http://www.schutzaecker.de/>

Germana Federacia oficejo por la protekto de la naturo - kun internaciaj ligoj, Rugha Listo (de, ..): <http://www.bfn.de>

Austra NRO por reteni la diversecon de la naturaj plantoj, disdono de semoj (de, en):

<http://www.arche-noah.at/etomite/>

Abelbredistoj favoras florantajn pejzaghojn (de): <http://www.bluehende-landschaft.de/>

Konservi la diversecojn de la bredataj plantoj: <http://www.nutzpflanzenvielfalt.de/>

Jhurnalo de la bio-vendejoj - granda ordigita listo de ligoj (de): <http://www.schrot-und-korn.de/links/>

2009-08-15 Je la bordo de la Indus-Deltao estis plantitaj 541.176 mongrovo-arbidoj en areo de 325 hektaroj dum unu tago (por eniri la rekord-libron). Sed pli grave: tiel Pakistano kunlaborante kun NRO WWF unue subtenas la fishojn, ĉar mangrov-radikoj donas la plej bonan lulilon por fishidoj; due ghi preventas kontraŭ ondo-inundegoj de la maro, ĉar la mangrovoj malfortigas la ondojn; kaj trie estas bone por la klimato.

<http://www.sonnenseite.com/Aktuelle+News,Pakistan-500.000+Baeume+an+einem+Tag,6,a13522.html>

--

2009-08-16 La orienta parto de la Aral-Marĉo en 2009 jam plene sekighis !

Kasahio sukcesis reteni kaj eĉ re-plenigi la nordan parton, dank al bona politiko. Sed la diktaturo en Uzbekio fakte ne interesighis fari la taugajn pashojn kaj kunlabori kun eksterlandaj NRO-oj.

Jen la satelita-foto: <http://www.presstext.at>

3w.sonnenseite.com/Aktuelle+News,Ostteil+des+Aralsees+vor+voelliger+Austrocknung,6,a13533.html

La maldekstra parto de la satelita bildo montras la staton en 2006. La Amu Darĉa delonge ne plu atingas la maron, sed estas haltita per barajho proksime de Kungrad kaj Nukus. La iama insuleto Wozrozhdenja, kie Sovet-unio praktikis ege dangherajn militajn esplorojn pere de bakterioj kaj virusoj, nun estas duon-insulo; sekve de tio pli facile eblas ke ratoj k.a. transportas la malsanojn al la homoj. La regiono Karakalpakio estas en katastrofa situacio: la viv-atendo reduktighis de 64 al 51 jaroj. Salo - miksitaj kun pesticidoj, ĉefe el la monokulturado de koton, trovighas en la aero kaj la vento transportas ghin al la plej altaj montoj, kie glacheroj pli rapide degelas - dume ili ekzistas.

La norda parto trovighas en Kasahio; ili zorgis ke la Syr Darĉa restu fluanta rivero, kaj dank al barajho la akvo ne fluas en la sudon.

2009-05-16 Pri la Aziaj Krabroj - en Francio:

Aziaj krabroj (tre granda vespo-simila speco) endangherigas la abelojn en suda Europo:

« Se vi frandas la mielon kaj ĉefe se vi konscias pri la graveco de la rolo de la abeloj en la polenado de ĉiuj plantoj, legomoj, fruktarboj, legu ĉi-sube kaj kunagadu .." »

Kun la plivarmighinta tempo, la reghinoj de la AZIAJ KRABROJ ekviglighas kaj eklokazilas la plej taugajn ejojn por starigi sian socion. Estas tie ke, nun, nepras enkapiti ilin.

Post la mezo de majo tro malfruos ... Tiu speco, veninta ek de 2004 el Ĉinio, estas tre multoblighema kaj danghera; ghi estas la plej malbona predanto por la abeloj, kiujn ni konas.

Nuntempe en la Sud-Okcidenta regiono estas proksimume 1 nesto po 200-500 metroj.

Nur malgrandega kvanto de tiuj nestoj videblas; ofte ili trovighas supre en arboj.

Do ni "batalu" kontraŭ tiu insekto kaj nuntempe tio relative facilas. Simplaj kaptiloj sufichas.

Sufichas dedichi al tio 1 ghis 2 minutojn kaj tio kostas malpli ol 50 centimoj da eŭro.

Por fari reghin-kaptilon, malplena plastika botelo sufichas; tranĉu ghin en du partojn, kaj remetite inverse la parton kun la shtopil-truon en la alian.

Vershu en ghin iomete da bruna biero (ne blonda) kaj iom da akvo, sukerita aŭ ne, sed certe ne mielon. Unu sola kaptilo sufichas por balkono, fenestrobreto, k.s. Vi povas uzi plurajn el ili en ĝardeno, preferinde je ia alteco kaj laueble shirmita de la pluvo; 1 kaptilo po 500 ghis 1000 m²

Nepras scii, ke ĉiu krabro kiun vi kaptos inter la mezo de marto kaj la mezo de majo estas neeviteble reghino. Unu kaptita reghino = unu nesto malpli.

Averto de J-M Cash:

Hodiaŭ sur la radio-stacio France Inter, mi audis intervjuon de insekt-fakulo (entomologiisto), li parolis interalie pri tiuj aziaj krabroj. Li konfirmis, ke kelkaj kaptiloj dismetitaj ne kapablas malaperigi ghin, sed mortigos ankau multajn aliajn insektojn.

Al la demando, chu oni konsideras fari pashojn por elradikigi, ekstermi ilin en nia lando, li respondis ke ne, ĉar ĉeesto de tiu specio en Francio estas tute nova, oni ankoraŭ ne scias kiel ekvilibro aŭ mal-ekvilibro starighos inter ĝi kaj la aliaj specioj. Ĉiujare aperas multaj neinvititaj specioj, oni nur devas pristudi la adaptighon kaj evoluon...

(de J-M. Cash, kiu en pli frua retmesaĝo avertis - laŭ aliaj ret-respondoj pri la unua mesaĝo rilate la aziajn krabojn - pri tiaj mesaĝoj, kiuj ne havas sufiĉe scienca fonon)

Jen tre detala artikolo pri tiu-ĉi "Vespa velutina" en la germana:

<http://www.hymenoptera.de/html/velutina>

Bio-Patentoj: Europaj NRO-oj transdonis protest-leterojn al la Europa Patent-Oficejo por bari la patentojn al vivantaj. Aktuale temas pri deziro de firmao al europa patento pri aparta geno en porkoj, kiu garantias pli fortan/rapidan kreskadon. La NRO-oj plendas ke teksto de la patento monopoligus la tutan bredado-evoluon je porkoj (kaj eble aliaj bred-bestoj).

--

Germanaj NRO-oj kaj civitanoj konvinkis la agrar-ministrinon Aigner malpermesi la semadon de GMO-majzo MON810. Tiu gen-teknike manipulita speco de majzo produktas la (nature) venenon Bt (botulinus) kiu estas venena kontraŭ insektoj. Ties celo ja estas mortigi papilieton kiu damaĝas al la majzo. La kausoj por malpermesi ĝian uzadon:

1. La polenoj de tia GMO-majzo mortigas ankaŭ aliajn insektojn se ili manĝas ilin, ekz-e abelojn.
2. Ĝies genetika heredaĵo povas aliri pere de flugantaj polenoj al alia specioj de majzo.
3. Ekzistas aliaj sanaj riskoj
4. La monopola situacio de Monsanto, kiu premas la kampanojn. (2009-04-15), legu ankaŭ la Sennaciulon de 2010/2 (?) pri GMO.

Ekologio & Manghado & Vivo

Manghi konsciencoj "Slow Food" (de - internaciaj ligoj): http://www.slowfood.de/youth_food_movement/
2009-11-14 Nov-Jorko: La mangh-kooperativo en kvartalo Park Slope de Novjorko estas eble la plej granda mangh-kooperativo en la mondo. 15,000 membroj laboras tie **unu tagon** po monato kaj aĉetas tie pli ofte. Pli-parto de la membroj estas vegetaranoj sed ne ĉiuj. Ĝi koncentriĝas pri ekologiaj temoj (i.a. per gazeto papera kaj reta), same kiel ĝi interesighas pri vegetarismo.

Bickiklado: Pluraj membroj **laboras tut-tage** oridigi/gardi la centojn da bicikloj de membroj alvenantaj, laborantaj kaj aĉetantaj per biciklo. Tiu speco de laboro komencis nur antaŭ unu jaro.

<http://www.foodcoop.com> www.foodcoop.com **Kunlaborantaj esperantistoj bonvenaj.**

Pli: <http://www.esperanto-nyc.org> www.esperanto-nyc.org (Neil Blonstein <neil_nachum@yahoo.com>)

Ekologio & ekonomio:

Komisiono pri la kreado de pli konvena ekonomia-ekologia-sociala indico:

<http://www.stiglitz-sen-fitoussi.fr/en/index.htm>

Vegetara manghado kontraŭ la klimata krizo:

En Gent, Belgio oni decidis ke Ĵhaudo estos vegetara tago por publikaj manghejoj kaj ankaŭ la restoracioj havu almenaŭ unu vegetaran pladon. Krome Gent estas urbo kun 94 vegetaraj restoracioj, kaj haveblas mapo kie ili troviĝas. La ideo venis de la Etika Vegetara Asocio de Flandrio. Mi rememoras la bonan vegetaran manghajhon okaze de la UK en Zagrebo.

Pli bone eluzi la resursojn - TU-Berlin esploras ripari kaj plibonigi anstataŭ forĵetitajn aparatojn ktp.

(de) <http://www.besser-nutzen.de>

ekz-e: reuzi komputilojn - riparejoj por komputiloj, anstataŭ ĉiam aĉeti novajn; jam kun adresoj de firmaoj: (de) <http://www.reuse-berlin.de/>

Komunumoj kiuj agas respondece rilate la klimata ŝanĝiĝo kaj la fosiliaj fueloj. (en)

<http://www.transitiontowns.org/>

Tutmonda urba partnereco - jen kun Berlino (ekologio, energio, kulturo, ...): (de,en,fr) <http://soned.de>

--

Malkresko - pli bone ol daŭra kreskado: En Francio ne nur EDE sed ankaŭ "Objecteurs de Croissance" (Kontraŭuloj de la kreskado) partoprenis la balotadon al la Europa Parlamento. Kompreneble ili gajnis nur 0,04%. Sed ankaŭ ili havis bonan ideon:

Ni devas serĉi ekonomian vojon kiu ne dependas de daŭra kreskado. Kelkaj Verduloj akceptis la tezon, sed Daniel Cohn-Bendit (la pinta kandidato) titolis ilin fantaziuloj, same kiel li ne akceptas Esperanton. (fr) <http://www.ladecroissance.net/>

Ekonomia kreskado - limo je 1,8%, pro la klimato kaj limigitaj resursoj.
(de) http://de.wikipedia.org/wiki/Hans_Christoph_Binswanger
ekonomisto en St. Gallen, favoras ekologian imposto-reformon.

Bhutan survojas al nacia felicho - kontraste al la kutima brutta nacia produkto. Ili evoluis 9 temojn kiuj necesas por atingi kaj teni la felichon: ekologio, kulturo, registarokiu bone regadas, edukado kaj klerigo, sano, vivantaj komunumoj, homeca tempouzado, psika bonfarto kaj vivnivelo. (taz, 2009-12-06, p.19)

Wael al Mahdi pri Daurigeblo: <http://waelalmahdi.com/?p=187&cpage=1#comment-37>

Ekologio & socio & paco & religio:

2009-11: P.R. Chinio / Tibeto: Detruo de la stabileco de la tibeta ekosistemo.
Malnov-tipa socialisma eksperimento detruas la tibetan kulturon.

Antaue: Honora Rememoro al la ekzekutitaj (pro bruligo) Lobsang Gyaltzen, Loyak, Penkyi kaj "sen-noma" homo kiuj estis mortigitaj en P.R.Chinio (2009-10-20) 2 tagojn post la brila prezentado de la china libro-kulturo okaze de la germana libro-foiro en Frankfurto. Ili partoprenis je la protestoj okaze de la Olimpikaj Ludoj en Pekino 2008.

Fakte: La tibeta altebenajho (inter 4 - 5.000 metroj super la maro) estas ne tre stabila pro la klimataj kondiĉoj. La stepo plej bone estas uzata per nomadismo, tiel ke la nombro da besto kaj la tempo de restado de la gregoj je unu loko estas mallonge. Tiel la grundo restas surloke kaj la dauripoveco estas garantiata. Pro ia - supozeble politika - kazo oni devigas la homojn cedi la nomadisman vivon, kaj loghi en betonitaj domoj, al kiuj ili ne estas adaptitaj. Simila deviga civiligo okazis en Romanio sub la diktatoro ! Tiuj homoj ne havas alian laboron ol bestobredado, sed por tio ili bezonas nomadumi. Sed tiel ili estas pli facile kontroleblaj. La plano estas ke la nomadismo reduktighu je 80%

AVE-anoj verkis detalan artikolon pri la iama senarbarigo, kiu estis publikigita en la china ĵurnalo: Tutmondaj Scienco kaj Tekniko, 1996/3, p. 30-34 (cn, eo) kaj http://www.verduloj.org/tib_senarba.htm
El la Okcidenta Trezorejo "Xi-Zang" Chinio ekspluatas diversajn ercojn; plej ofte en subchielaj minejoj, kaj el la montoj de la ne-uzebila grundo venas toksaj mineraloj en la akvon kaj en la aeron. Chinio sindevigis observi la regulojn de "Extractive Transparency" - <http://www.eiti.org> - natura medio kaj sano estas almenau marghenaj punktoj chi-rilate.

Homoj (kaj bestoj ?) en la proksimeco malsanighas. El Tibeto devenas minimume 5 el la plej gravaj riveroj de Azio, kies akvo estas malpurigita tiamaniere. Homoj en 11 landoj interesighas pri la kvalito de iliaj riveroj. Fonto kaj pli da informoj (de,en): <http://www.tibet-initiative.de>

Kaj jen eldiro el ampleksa artikolo de China Radio Internacia pri la evoluo de Tibeto:

"... ni certe povas krei evoluon vojon kun ĉinaj trajtoj kaj tibetaj karakterizoj kaj konstrui novan socialisman Tibeton, pli prosperan, pli riĉan kaj pli belan." (necesus demandi la tibetan etnon chu ili kunsentas): <http://esperanto.cri.cn/621/2009/10/23/1s104446.htm>

Sed ne nur temas pri tibetanoj - ankaŭ homoj el la han-etno riskas malliberejon, se ili "ne kondutas agrable". Homoj kiuj volis protesti pro maljusta pritrakto flanke de firmaoj au lokaj aŭtoritatoj ofte estas forrabitaj kaj trovighas en t.n. "Nigraj Malliberejoj" (cn: hei yu) por rezigni la plendon.
(Lau Human Rights Watch kaj "taz" 2009-11-13 p.1+3)

Paco en Afriko - kunsidi por redukti la konfliktojn, moderi je unuopaj lokoj kie povus okazi konfliktoj, ekz-e je akvo-putoj, lernejo, kaj je la limoj. Tion instigis s-ino Dekha Abdi el Somalio je la limo al Kenio. Shi opinias, ke ankaŭ internaciaj problemoj estus moderigeblaj, kiel ekz-e la klimata problemo, aparte pere de la shangho de komunumaj politikoj. Shi investis la monon por la t.n. Alternativa Nobelpremio (2007) en Paco-Universitaton, kie oni instruas kiel moderi konflikt-partiojn.

Unitarian Universalist Esperanto Network: Por atingi la celon de la 6-a Principo pri mondkomunumo kun justeco pri komunikado per Esperanto. <http://www.grupoamikema.org/UUEN.html>

Laicismo: artikolo pri blasfemio-legho: <http://hpd.de/node/8265>